

NiaBulteno

ISSN:0871-9241

JANEIRO 2006 - JUNHO 2008 • JANUARO 2006 - JUNIO 2008 • Numero 90

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-^oA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

Johano lanĉas *La Karavelon*

*Multjara revo realiĝis per
apero de literatura gazeto:
Imponan kolofonon kaj
ambician projekton.* **pĝ.7**

Wilson gvidas la Libro-Servon

*depost 2007, pro emeritiĝo
de ties "kapitano". Sciu pri
ŝanĝoj kaj pluoĝ en* **pĝ.5**

24-a Renkontiĝo: Ripete en Alcochete!

*La semajnfinojn 4-5-an de oktobro vin
atendas la ĉarma ĉetaja sudlisbonia urbo
Alcochete, okaze de la 24-a Renkontiĝo
de Portugalaj Esperantistoj*

pĝ.6

F. ANTUNES

Forpasis Fernando Costa

Kasera



*Manuel Domingos TERRAMOTO,
Olhão: 1921-2007*

*Fernando Domingues da COSTA,
Matosinhos: 1920-2007*

kaj Domingos Terramoto

Numero tute farita per nova komputilo!

pĝ.15

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 90 (jan. 2006 - jun. 2008)

Redaktis: ISSN:0871-9241

António MARTINS-Tuválkin
Reviziis: **A. da Silva ALMEIDA**
Eldonkvanto: 360 ekzempleroj
Abono (4n-roj, nur eksterlande):
8-ono de landa MA de UEA
Unuopa ekz. (87-90): 5,00 €
PDF-e havebla el http://www.esperanto.web.pt/nb_jxusa.html
Finkompostita en: 2008.07.31
Limdato por NB91: 2008.09.12



**Portugala
Esperanto-
Asocio
Associação
Portuguesa de
Esperanto**

(pessoa colectiva de utilidade pública)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359 o
☎ +351 217 933 924
✉ <contacto@esperanto.web.pt> (eo)
aŭ <asocio@esperanto.web.pt> (pt)
Ⓔ <http://www.esperanto.web.pt/>
Ⓔ <pea_diskut@yahoooogroups.com>

CAE: 91331 NIF: 501 547 312
Fondita en 1972.04.25
Landasocio de U.E.A. ekde 1979
K-Obs.: Faria de Bastos
Membroj: 129(+55) en 2008.07.07
Monata kotizo: 2,22 €
(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:
1,48 €; malriĉuloj: 0,00 €)
Aniĝkoto: 3,70 €
Pagojn al bankkontoj:
(BIC: CGDIPTPL) IBAN: PT50
0035 064 000 025 961 430 49 aŭ
NIB: 0035 064 000 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2007.03.17)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:
Prezidanto: Faria de Bastos
Sekretarioj: Antónia CARVALHO
Iuri GASPAR

Estraro:
Prezidanto: José MARTINS
Vicprezidanto: MARTINS-Tuválkin
Sekretario: Alcino ALVES
Kasisto: Miguel BOIEIRO
Voĉdonantoj: Wilson BRÍGIDO
Alexandra Paz
Nuno MAGALHÃES

Kontrol-Komitato:
Prezidanto: A. da Silva ALMEIDA
Revizoroj: Vítor MARQUES
Francisco MELO

Post tre longa halto

(intence mi ne uzas la maltaŭge mildan vorton "paŭzo") jen revenas al viaj manoj *Nia Bulteno*. Du plenaj jaroj pasis depost la apero de NB89 kaj tre praktika averta nun fareda temas pri eble prinoticindaj faktoj kiuj ial eskapis redakton en tiu ĉi numero: tiuj aperos laŭ-eble kaj -bezone ankaŭ en NB91. Pri la farto de nia informorgano direndas ke la dumo estis (krom alitaska) fazo repens(ig)a: Al mi diverstonaj kaj eĉ diversdirektaj konsiloj (kaj instigoj... kaj eĉ ultimatumoj!) venis, sed ĉiuj konsentis ke "la tempoj" novas por io kia nia bulteno — plian fojon post la ŝanĝiĝoj de 2001 kaj 1995 (kaj 1989, 1987, 1979 k.t.p). Pensinte kaj meditante, estis decidite plu publikigi la bultenon senŝanĝe, en la dume ŝanĝiĝinta ĉirkaŭo. Bonvenigon, do, kaj apogon — petas via *red.*

NEBALOTITAJ POSTENOJ:

Instruado: Alexandra Paz
Libro-Servo: Wilson BRÍGIDO
Biblioteko: Eduardo CRISPIM (ag.)
(periodaĵoj) Silva ALMEIDA
(eltondaĵoj) MARTINS-Tuválkin
(sonregistroj) Carlos MOREIRA
(diversaĵoj) (vakas)

Gazetaro: (vakas)
Subvencioj: (vakas)
Ekspozicioj: (vakas)
Komputservo: Nuno MAGALHÃES
A. MARTINS-Tuválkin
Luís OLIVEIRA
Fotarkivo: Olga ALMEIDA
Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES
Poŝtmarkkolekto: A. CARDOSO

HONORAJ MEMBROJ:

António da Silva ALMEIDA
Alsácia Fontes MACHADO ☐
Manuel de FREITAS ☐
Alberto Pedro da SILVA ☐
Adelino Franco SIMÕES ☐
Manuel de Sousa TEIXEIRA ☐

LOKAJ SEKCIJ:

PLUS — Portugala Loka Unua
Sekcio (nordokcidenta sekcio)
Repr.: Nuno MAGALHÃES
Fond.: 2002 Membr.: 23
✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ºA
PT-4150-589 PORTO
☎ +351 917 721 868
✉ <plusanoj@clix.pt>
Ⓔ <http://www.esperanto.web.pt/plus.htm>

JUNULARA SEKCIO:

Portugala Esperanto-Junularo
Jovens Esperantistas de Portugal
Fond.: 1993 Membroj.: 22
(L.S. de TEJO ekde 1996)
Ⓔ <http://www.esperanto.web.pt/pej.htm>
✉ <pej@esperanto.web.pt>
☎✉: ĉe P.E.A.

ALIAJ ORGANIZOJ:

Nogeso — Norda Grupo de
Esperanto-Studado
☉ kafejo Estrela d'Ouro; str. Fá-
brica; Oporto (antaŭaverton)
✉ <nogeso@gmail.com>
Ⓔ <http://www.nogeso.cjb.net/>
☎✉: ĉe PLUS
Saluton! — Cooperativa dos Ami-
gos do Esperanto e da Natureza
☉ 2-an dim. ĉ.mon. 15:00; Cacém
✉ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACOVA
✉ Rua do Miradouro, 12
PT-2735-300 CACÉM (SNT)

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: Manuel PINGUINHA (ktzp.)
U.E.A.: Faria de Bastos (K-Obs.)
ILEI: Alexandra Paz (ag.)
E.E.U.: Faria de Bastos
TEJO: Alexandra Paz (A-kom.)
ILERA: Francisco MELO (CT1CGE)
EJA: Faria de Bastos
SAT: Pedrosa ALVES (kotizp.)
IKEK: Alcino ALVES
IKUE: Salette dos SANTOS

ASOCIO:

Asembleoj 2006-2008

Ĝen. Asembleo de 2006

La 25-an de marto kunvenis 15 asocioj por prezento de la intermandata estrara raporto, kio pasis senplie.

Ĝen. Asembleo de 2007

La kandidataro elektita en 2005 (vd. NB86:4 kaj NB87:3-4) finis sian mandaton laŭplane kaj estis anstataŭita de novelektita organaro (vd. pĝ. 2) prezentiĝinta al la Ĝenerala Asembleo kunveninta la 17-an de Marto, 2007, kun ĉeesto de sep asocioj. Ties konsisto apenaŭ prezentas ŝanĝojn, kun anstataŭo de unu estrarano (Hugo LOURENÇO al Nuno MAGALHÃES) kaj kompensoj de forpaso kaj rezigno, en la Asemblea Stabo.

Ĝen. Asembleo de 2008

La 15-an de marto kunvenis 7 asocioj por prezento de la jara estrara raporto. Montriĝis duboj pri la kont-organizo (ne pri la rezulto!), kiel okazis en 2005 sed kun pli rapida solvo: Taskigi la estraron solvi kaj reraporti. **AMT**

HOMOJ:

"Marbordo kaj Tertremo"

Forpasis dum la jaro 2007 du elstaraj esperantistoj portugaliaj: Fernando Domingues da COSTA (sep. 6) kaj Manuel Domingos TERRAMOTO (nov. 15). Aperos laŭeble detalaj biografioj en NB91. (**Kovrilfote**, ili babilas en V.F.X. dum la 19-a R.P.E., en 2003.) **Red.**

AVISO CONVOCATÓRIO:

Assembleia Geral dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto

Nos termos do artigo 22º dos estatutos desta Associação, convoco a Assembleia Geral para reunir em sessão **extraordinária** no próximo dia 5 (cinco) de Outubro, domingo, pelas quinze horas, nos **Paços do Concelho de Alcochete**, sitos no Largo de São João, em Alcochete, com a seguinte ordem de trabalhos:

(ponto único) Apreciação de proposta da Direcção para aumento do valor da quota mensal para 3,00 € (três euros), a vigorar a partir de 2009.

Convoco desde já a Assembleia Geral para reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se tiver formado quórum.

Luanda, 10 de Julho de 2008

O Presidente da Mesa,

Dr. Miguel Albino de Faria de BASTOS

ASOCIO:

Kotizo plu 2,22 € ĝis 2009

Laŭ ĵusa decido de la Estraro, la monata kotizo restos **senŝanĝa** post la inflacikorekto de 2007.04.21 al 2,22 €, ĉar la plej eta ebla valoro (2,40 €) estus tro granda proporcia grandigo de 2,10 €, la bazvaloro aprobita en 2005 (14,3%, la duma inflacio estis 8,1%). La estraro tamen decidis **proponi absolutan grandigon** de la kotizo (do, ne simplan inflacikorekton), al 3,00 € monate, diskutota kaj "aprobuta" en eksterordinara kunveno de la Ĝenerala Asembleo okazonta dum la 24-a R.P.E., oktobre (vd. pĝ.3). **AMT**

ASOCIO:

Ĉu ne plu miks-.pt?

Sekve de la liberaligo de retnoma atribuado en Portugalio (vd. NB89:11), nia asocio decidis finfine, en majo 2008, registri por si la nomon *esperanto.pt* sen atendi la komplikajn marknoman registriĝon en *Conservatória do Registo Comercial*. Se sukcese, *esperanto.pt* estos uzata anstataŭ la nuna *esperanto.web.pt* — kaj retpaĝadrese kaj retroŝtadrese (vd. ĉisube). **AMT**

ASOCIO:

Ret@dresoj

Depost la unua de marto, 2008 la retroŝtaj adresoj de Portugala Esperanto-Asocio alias. Restas la antaŭa funkciado, sed ŝanĝiĝis la poŝtujnomoj, celante perdigi la vojon al spamistoj (*):

info@iĝis kontakto@
portugala@iĝis asocio@
pej@iĝis junularo@
nb@iĝis bulteno@

Bedaŭrinde, la adresoj *werther@esperanto.web.pt* kaj *fs@esperanto.web.pt* ne plu estas necesaj. **AMT**

INFORMADO:

Nova reta informservo

Laŭ estrara decido, estis kreita plia retroŝta listo mastrumata de nia asocio en *Yahoogroups*, nomata “*pea_inform*”. Tiu nova listo aldoniĝas al “*pea_diskut*”, “*pea_anonc*” kaj “*pea_estrar*”, kaj ĝin same administras A. MARTINS-Tuválkin (mastro), José MARTINS kaj Nuno MAGALHÃES (estroj).

Tiu ĉi nova listo estos nur dissenda, ne foruma; ties ĉefa lingvo estos la portugala kaj ĝi celas ĉiujn interesatojn (ne nur membrojn) pri la temo esperanto en Portugalio. La dissendoj temos ĉefe pri lernado de esperanto kaj iom ankaŭ pri gravaj novaĵoj au sciigoj.

La nuna priskribo estas: «*Informações em português sobre a utilização e aprendizagem do esperanto em Portugal, enviadas pela Associação Portuguesa de Esperanto, para sócios e não-sócios.*»


Vd. http://groups.yahoo.com/group/pea_inform. Kompare al la nunaj *pea*-listoj (kaj aliaj samtemaj grupoj), “*pea_inform*” distingiĝas pro tio ke ĝi estas nure dissenda (male al “*pea_diskut*”; do taŭga por homoj kiuj ne volas ricevi multajn mesaĝojn), ne ekskluziva por membroj (male al “*pea_anonc*”), kaj ĉefe portugallingva. Interesatoj povas membriĝi pere de la retejo de *Yahoogroups* aŭ per sendo de malplena mesaĝo al pea_inform-subscribe@yahoogroups.com. Tiu ĉi invito aniĝi estis sendita al ambaŭ ĝeneralaj *pea*-listoj. Simila portugallingva invito estos sendita ankaŭ al tiuj ĉi listoj kaj al kelkcent registritaj interesatoj.

Aldona rimarko: Kial uzas P.E.A. la sistemon *Yahoogroups*, konsiderante ties fuŝan paĝarfasadon kiu tre malbone elportas neanglan tekston? Nu, se la aferon ni ekus nun de nulo, certe *GoogleGroups* aŭ io alia estus preferata. Sed ni konstruas sur jam farita laboro kaj en 2001 *Yahoogroups* estis la plej bona solvo. Dume ni ekkonis kelkajn trukojn eluzi la avantaĝojn de *Yahoogroups* kaj eviti ties malavantaĝojn, kaj tio dume decidigas al konservo de la nuna provizisto. Sed ŝanĝo al io pli bona estas ĉiam konsiderata kaj tre verŝajne iam okazos. **AMT**

(*) Ĉar spamistoj spuras adresojn eĉ ene de (enretaj) *pdf*-dosieroj, mankas “*esperanto.web.pt*” post ĉiu “@”.

LIBRO-SERVO:

Wilson kapitaniĝas



Iom konsterne la estraro ricevis eke de 2007 sciigon el António da Silva ALMEIDA (🐞) ke en julio samjara li ĉesos sian longdaŭran laboron kiel zorgisto de la asocia Libro-Servo (ĉ. 1982-1988, transpreninte el Olga ALMEIDA, kaj depost 1992). Tamen tre baldaŭ troviĝis taŭga anstataŭanto: Jen Wilson Brígido da SILVA (🐞), kiu tiam transdonadis al Alexandra PAZ la estrecon de la Lerna Fakoj. La nova librvendejestro "lernis la metion" dum du monatoj kaj la jubileinto plene emeritiĝis en oktobro 2007. Nova postenulo ne signifas novan politikon, sed novaĵoj estis (800,00 € da akiritaj vendotaĵoj) kaj estos (reta katalogo). «Demando via pri novaj aŭ elĉerpitaj titoloj helpas decidi mendojn.», alvokas Wilson. **AMT**

INFORMADO:

Ree en Expolingua (2007)

De la 8-a ĝis la 10-a de Marto 2007 okazis en Lisbono foiro pri lingvoj kaj kulturoj / 17.^a *Salão Português de Línguas e Culturas* — en kiu ĉeestis Portugala Esperanto-Asocio (P.E.A.). La partopreno en tiu grava evento, post 9 jaroj da malĉeesto (vd. NB89:11), nur eblis danke al signifa rabato favordonita de la foirorganizanto (*).

Rilate al antaŭaj jaroj, la nombro de institucioj ĉeestintaj reduktiĝis, tamen daŭris la altnivela kvalito de la partoprenantaro, kio donas certan prestiĝon al P.E.A. Krom tio, la ĉeesto de la Asocio permesis sufiĉe bonan disvastigon de Esperanto.

Dum la unuaj du tagoj, la P.E.A.-budo estis vizitata de centoj da lernejoj akompanataj de iliaj instruistoj. La lastan tagon, sabaton, la vizitantaro apartenis al alia tipo, pli diversa, sed same interesiganta. Vendredon, José MARTINS prezentis lecionon de Esperanto (🐞), kiu kaptis la atenton de la preterpasantoj. Ĝi okazis en kulturdistra loko speciale preparita por tiaj agadoj, kie, laŭlonge de 3 tagoj, estis montrataj aliaj lingvoj, apenaŭ konataj de la vasta publiko.

Kelkaj vizitantoj montris volon aĉeti librojn kaj alian materialon sed la malgranda stoko tie disponebla ne permesis plenumi ilian deziron. El ĉi tiu miso P.E.A. devas lerni por estontaj partoprenoj.

Akurate kaj sindediĉe deĵoris en la budo Alcino ALVES, Eduardo CRISPIM, Wilson BRÍGIDO, Luís LADEIRA, Iuri GASPAS kaj Cláudia SOARES. Ankaŭ mallonge ĉeestis António MARTINS kaj João SANTOS.

Indas substreki ke, la lastan tagon, la budon vizitis de la prezidanto de *Expolingua*, kiu montris sian plezuron pro la ĉeesto de P.E.A. en la foiro. **AA**



(*) En la 2008-a okazigo de *Expolingua*, nia asocio ne povis ĉeesti pro manko de financaj rimedoj, kvankam simila rabato estis ofertita. **Red.**

XXIV-a RENKONTIĜO DE PORTUGALAJ ESPERANTISTOJ:

Ripete en Alcochete



Simile al U.E.A. mem, kiu ĵus decidis Havanon por la 2010-a Universala Kongreso, gastigintan jam en 1990, kaj kiu kongresis dufoje en Pekino (2004 kaj 1985) kaj en Roterdamo (2008 kaj 1988), ĉijare ankaŭ nia asocio revenigos al *Alcochete* (de kelkaj esperantigata kiel Alkoŝeto) sian (24-an) **Renkontiĝon de Portugalaj Esperantistoj**, kiu tie okazis jam en 2000 (vd. ankaŭ pĝ. 10). La lokan subtenon garantias la estrara kasisto **Miguel BOEIRO**, elstara alkoŝetano, kaj la **Amikeca Grupo** de tiuurbaj esperantistoj.

La semajnfino **4-5-an de oktobro** vin atendas do tiu ĉarma ĉetaĵa sudlisbonia urbo; la renkontiĝaj sesioj okazos en la **☉Municipestrarejo** (*Paços do Concelho*), same kiel ekspozicio pri esperanto, vizitebla de la 29-a de septembro ĝis la 10-a de oktobro.

Ĉeestontojn bonvenigas la akceptejo ĝis la 12:00 de sabato (eblas aranĝi tranokteblecojn kaj kunvojaĝon en/el Lisbono). Ĉiuj eventoj okazos, kiel kutime, en esperanto. Plenan programon en **NB91**. **AMT**

Rekomendataj loĝejoj (al lisbonanoj eblos reveni)

Hotel Al Foz ★★★ 🏠 Avenida D. Manuel I; 📍 <http://www.al-foz.pt/>; ✉ comercial@al-foz.pt; ☎ 212 341 179; ✂ [Ĥ][Ĥ] 95€, [Ĥ] 85€, +[Ĥ] 25€; ☉→ 700 m. **Quinta da Praia das Fontes** 🏠 Largo Marques de Soydes; 📍 <http://www.quintapraiafontes.com.pt/>; ✉ mail@quintapraiafontes.com.pt; ☎ 212 340 191; naĝ.; ✂ 5[Ĥ] 145€ (kuir.), [Ĥ][Ĥ] 88€; ☉→ 400 m. **Pensão Alfredo** 🏠 Rua do Paço, 10; ☎ 212 343 121; s/mmĝ.; ✂ [Ĥ][Ĥ] 35€ (s/nec.+duŝ.), [Ĥ][Ĥ][Ĥ] 55€, [Ĥ] 25€ (nec.+duŝ.); ☉→ 150 m. **Residencial Casa-blanca** 🏠 Rua Senhora de Sant'Ana, 2; ☎ 212 340 583; ☉→ 200 m. **Albergue da Juventude** 🏠 Quinta do Valbom; ☎ 212 342 508; kuir.; ✂ [Ĥ]...[Ĥ] po 10€, [Ĥ][Ĥ] 20€ (nec.+duŝ.); ☉→ 1 km.

XXIV-a R.P.E.:

Programo

Sabaton, 2008.10.04

09:00-12:00 (☉)

Akceptado de alvenintoj

12:00-14:00 (☉)

Komuna tagmanĝo

14:00-14:15 (☉)

Oficiala malfermo

14:15-19:00 (☉)

*Kulturkleriga programo:**(prelegoj anoncotaj, far**G.N., A.A., A.M.T.,**L.O., N.M., kaŭ aliaj)*

19:00-21:00 (☉)

Komuna vespermanĝo

21:00-23:00 (☉)

*Distra programo:**(filmo en esperanto)***Dimanĉon, 2008.10.05**

09:30-12:00 (☞→)

Paŝekskurso tra la urbo

12:00-14:00 (☉)

Komuna tagmanĝo

14:00-16:30 (☉)

*Movada programo:**Diplomtransdono**(prelego anoncota)***Ĝenerala Asembleo**

16:30-18:00 (☉→)

*Oficiala fermo kaj adiaŭo***Notoj:**

☉ *Paços do Concelho* / *Municipestrarejo*: 🏠 *Largo de São João* ☎ 212 348 582.

Situo: 38°45' N, 8°58' W.

①②③ (indikotaj restoracioj)

☞ antaŭ la *Municipestrarejo*: 🏠 *Largo de São João*.

LITERATURO:

Karavelo velas for

■ António MARTINS-Tuválkin

Pri La Karavelo mi ekaŭdis nelonge post mia eklerno de esperanto, en 1987. Mia tiamia dua-grada instruisto (*), Johano (João José SANTOS), vicigis alte inter siaj realigotaj projektoj kulturen revuon kiu vehiklu la portugallingvan literaturon... La Karavelo restis revo — ĝis kiam finfine en 2007 la revanto iĝis revuisto.

La unua numero aperis en oktobro tiujara kiel senpaga neprintebla (kolora) pdf-dosiero kun 24 paĝoj. La nombro de elŝutoj kuraĝigis la redaktoron kaj pliaj numeroj akurate sekvis en enviinda monata ritmo. En marto 2008 la ses unuaj numeroj aperis en papera formo, kunbinditaj en formato A₄, kun kolora kovrilo kaj nigre-blanka interno en altkvalita preso. (Vd. foton; 18,00 € en la Libro-Servo de P.E.A. kaj ĉe la eldonisto.) Laŭplane, tiaj paperaj eldonoj pluaperos dufoje jare.

La enhavon dividas tradukita portugallingva literaturo (el diversaj landoj) kaj alidevenaj tradukoj kaj originalaĵoj. Mi ne scias aprezi ĝian literaturan kvaliton, sed mi ja notas indicojn: Tri recenzoj en La Ondo de Esperanto, laŭtsonaj nomoj en la kolofono, kaj iva internacia videbligo de i.a. portugaliaj kaj grekaj esperantlingvaj aŭtoroj.

La projekto sidejas en eta kampara urbo Estremoz (kaj jen pozitivajo por la landa movado) kaj aldone al la revuo la iniciatinto preparas aldonajn elpaŝojn. Informiĝu en <http://esperantopt.com/>, ne malambicia ret nomo.

(*) Ĝis 1989, en P.E.A. estis nur du kursnivelejoj (gradoj).



«**Averto:** Aĉetinte apartajn volumojn de la revuo La Karavelo al P.E.A., la aĉetanto povas poste aboni la revuon ne perdante monon, kvazaŭ li estus dekomence aboninta ĝin ĉe la redaktojo.

Kontaktoj: 960 131 515
aŭ lakaravelo@gmail.com.»

Konstantaj kunlaborantoj:

Gerrit BERNELING
Luiza CAROL
Leo DE COOMAN
Roger de Castro GOTARDI
Edward JAŚKIEWICZ
Geraldo MATTOS
Valentin MELNIKOV
Irina MIRONOVA
Nikolaï NEĈAEV
Eduardo NOVEMBRO
João José SANTOS
Tibor J. SZABADI
SZABÓ Imre
Paulo Sérgio VIANA
Francisco S. WECHSLER



ARANĜOJ:

23-a R.P.E. en Elflufigarbo

Alcino ALVES



Stare, dekstren: A. Martins, R. Prieto, A. Paz, M. Pinguinha, A. Carvalho, M. Gaspar, L. Gaspar, N. Magalhães, J. Martins, J.^a Santos, W. Brígido, M. Boiteiro; *side, dekstren:* J.^a Santos, A. Alves, L. Ajm, M.^a Boiteiro, T. Ajm.

Tiu ĉi aranĝo, okazinta en Figueira da Foz (de iuj iom ŝerce esperantigita Elflufigarbo, de aliaj, Figejro), estis preparita kun sufiĉa antcipio. Fakte, post vizito al tiu urbo, en Marto 2007, kaj tuja favora estrardecido surloke, oni senprokraste petis la necesan apogon al la loka magistrato, celante uzon de urbodomaj spacoj kaj kunlaboradon de municipaj turismaj servoj. Tamen, la reago al nia peto venis tro malfrue kaj nur post kelkaj insistoj. Aliflanke, ĝi estis tre svaga kaj ne skribforma, situacio tute nova en la historio de P.E.A.. Antaŭ tiaj malfacilaĵoj, unu el niaj lokaj asocioj — D-rino Antónia CARVALHO — sindoneme kaj kuraĝe, sinpretis por organizi la eventon, per personaj elserĉoj kaj solvoj, kun akompano kaj apogo de la Asocio.

La Renkontiĝo, kie partoprenis ĉirkaŭ 30 homoj, okazis la **5-an kaj la 6-an de Oktobro 2007**.

La unuan tagon, la programo konsistis el komunaj manĝoj en lokaj restoracioj kaj kultura aranĝo en la

malnova liceo, aktuale *Escola Secundária Dr. Joaquim de Carvalho*.

Post la tagmanĝo, en bone provizita salono de tiu lernejo, novbakitaj lokaj esperantistoj deklamis poemojn en esperanto kaj raportis pri diversaj aspektoj de la urbo. Sekvis kanzonoj, ankaŭ en esperanto, interpretataj de pianisto kaj profesia kantistino, agreble surprizante la ĉeestantojn pro ilia arto. La entuziasmo de tiuj artistoj komuniĝis al la aŭdantaro kaj ĉe la fino ĉiuj kunkantis diversajn muzikpecojn, kies partiturojn D-rino Antónia CARVALHO zorge antaŭpreparis kaj disdonis tiucele. Post la vespermanĝo, la plej junaj ariĝis sur la kioskospaco de *Casino* por daurigi la kunfestadon.

La sekvantan tagon, sub gvidado de Alcino ALVES, oni organizis du-horan piedpromenadon tra padoj de la magia *Serra da Boa Viagem*, celante rigardadon de la riĉa loka flaŭro.

Post komuna tagmanĝo, ĉi-foje en alia restoracio, la partoprenantoj denove sindirektis al la salono de la

ARANĜOJ:

Ventoj subitaj sur sablo blanka

La 5-a Atlantika Plonĝado (NB89:10+16) okazis en marto 2006 sed oni ĝin ne forgesas: Jen malkutima portugalia aranĝo, kun variaj programo kaj anaro.



La malbonaj flankoj estas nur la vetero, la manko de nejunaj portugaliaj esperantistoj, kaj la nemulta kontakto inter ĉeestantaj komencantoj kaj spertuloj. Notindas bonega libro-vendado, la tre taŭga ejo, kaj la rolo de la organizintoj, Alexandra PAZ kaj Nuno MAGALHÃES, kaj de Rute JESUS (↓), kiu gvidis heterogenan komencantaron: portugaliaj skoltoj kaj AKEL-anoj ambaŭlandaj

(vd. NB88:6-7). En 2007 sekvis la Madrida IRO (NB91). **AMT**

Kataluna ĉeesto (*)

Sep katalunoj partoprenis la 4-an Atlantikan Plonĝadon organizitan de Portugala Esperanto-Asocio en la unua semajnfino de marto. Temas pri reciprokigo de la partopreno de portugaloj en nia pasintjara renkontiĝo en *Mataró* [NB87:6], kie estis neformale interkonsentite, ke la aranĝon organizos katalunoj, portugaloj kaj hispanoj, ĉiu en la sekva jaro, en similaj datoj.

La Plonĝadon partoprenis trideko da homoj, inter kiuj sufiĉe multaj komencantoj. La forte-

ga vento kaj ofta pluvo malemigris efektivan plonĝadon en la maro, kvankam ĝia muĝado bone aŭdeblis el la gastejo. Kurioze, la solajn tri prelegojn de la programo faris katalunoj: Hèctor ALÒS (↑) pri «Johansson kaj Steele: Trarigardo de niaj nun plej verkemaj prozistoj», Ferriol MACIP (↘) pri «Okcitanio, nevidebla lando, neekzistanta parolata lingvo» kaj Gerard ESCUER (↗) pri «Andoro, la lasta feŭda ŝtato de Eŭropo». Male, nokte la partoprenantoj ĝuis tre interesan kino-programon kun filmoj perfekte subtitolitaj al esperanto. **HAI F**

(*) el *Kataluna Esperantisto* 2006:1



malnova liceo, kie D-ro João SANTOS prezentis disertacion titolitan "La kvar kolonoj de la Esperanto-movado", kiu estis sekvata de vigla debato.

Reliefiga estis la profesia laboro de Juliana SANTOS, entuziasma novesperantistino, kiu klopodis disvastigi

la eventon pere de diversaj regionaj amaskomunikiloj, liverante skribajn informojn kaj raportojn, kaj ebligante kelkajn intervjuojn al ĵurnalistoj. Tiamaniere oni donis seriozan bildon pri Esperanto al la ekstera publiko en tiu regiono. ■

ARANĜOJ:

7-a Kongreso de E.E.U. en Maribor'

■ Miguel Boieiro



La 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, en kiu mi kaj mia edzino agrable partoprenis, havis kiel oficiala temo «La Akvo». Ĝi okazis dum unu semajno, 2007.07.28-08.04, en Mariboro (Slovenio), kaj fakte akvo ĉeestis abunde, ne nur en la majesta rivero

Drava sed ankaŭ dum iuj tagoj kiam multe pluvis, fuŝante niajn ekskursojn al la montaroj.

Partoprenis 395 homoj el 28 landoj. La programo estis riĉigita de multaj prelegoj (ne nur pri akvo; vd. foton), filmoj, teatraĵoj, fotoekspozicioj pri akvaj fenomenoj, poezio, muziko, rondaj tabloj, kaj ekskursoj en la mirindaj slovenaj regionoj. La etoso estis simpatia kaj tre agrabla.

Oni diskutis pri la strategio por grandigi la lernadon de esperanto kaj por ke la Eŭropo-Unio agnosku la internacian lingvon kiel oficialan. La batalo ne ŝajnas facila sed la partoprenintoj entuziasme sugestis diversajn metodojn kaj taskojn por atingi tiun celon.

Kompreneble ni profitis ĉi tiun bonan ŝancon por perfektigi niajn sciojn pri la lingvo kaj fari novajn amikojn. Estis do tre utila eksperimento kaj ni kore dankas al ĉiuj organizintoj. ■

ARANĜOJ:

22-a R.P.E. Avejro

La XXII-a R.P.E. okazis refoje en Avejro, la 16-an kaj 17-an de Septembro, 2006 — la antaŭa avejra R.P.E. estis la XIV-a, en 1990. La Urbeŝtaro disponigis modernan, komfortan konferencan salondon en la urba centro, tutapud la centra kanalo. La malfermon, je la 11-a horo, ĉeestis ĉ. 20 esperantistoj. Gastparolis urbeŝtarano kiu, tre simpatie, estis aĉetinta esperantan lernolibron! (Dum la tuta tago en improviziata vendstablo kun esperantaj libroj deĵoris juna loka esperantisto Maria Boia MARTINS.)

Sekvis portugallingva prelego fare de Manuel PINGUINHA pri vortderiva-

do en esperanto kaj en la portugala. Poste oni komune manĝis en la malnova fiŝkaptista kvartalo, kaj posttagmeze, ree en la salono, sekvis interesaj programeroj: Prelego pri marbordprotektado en centra Portugalio, fare de loka fakulo José MARTINS, kaj poste praktika sesio pri ŝipistaj ŝnurnodoj, gvidata de ambaŭ menciitaj lokanoj. Dum la tago oni povus viziti pentraĵan ekspozicion okazanta samtempe en la renovigita konstruaĵo. Post la vespermanĝo oni spektis — eĉ se sen perfektaj kondiĉoj... — la sciencfikcian filmon *eXistenZ* (David CRONENBERG, 1999), subtitolitan en esperanton laŭ traduko de Alexandra PAZ.

Dimanĉon, la 17-an, oni ĝuis la ►

ARANĜOJ:

Pri la SenPrograma Renkontiĝo 2007

■ **Alcino ALVES** (2007.08.30)

Aranĝita de energiaj Akaj gajaj junuloj apartenantaj al tri organizoj — Varsovia Vento, Kataluna Esperanto-Junularo kaj Valencia Esperanto-Junularo — okazis en la hispania urbeto *Callosa d'en Sarrià* (prov. Alakanto), dum la semajno de la 16-a ĝis la 22-a de Aŭgusto 2007, evento kiu havis la elvokivan nomon “**SenPrograma Renkontiĝo**” (SPR). Malgraŭ la elvoko, neniu enuiĝis kaj programeroj iom-post-iom spontane ekaperadis: migrado en la Naturo, plonĝado en rivereto, muzikumado, kunvivado, bierumado... Krom ĉi tiuj distraĵoj, oni ankaŭ trovis tempon por plenumi pli seriozajn agadojn, el kiuj menciindas ekspozicio pri lokaj sovaĝaj plantoj kaj intensiva kurso de Esperanto.

Ĉeestis ses dekoj da gejunuloj ventintaj el deko da landoj. Ankaŭ aktive partoprenis la eventon la subsribanto

▶ naturon per ŝippromenado en la avera lago: ĉiam agrabla tempo, eĉ se la vetero jam ne tro varmas! Reveninte al Avejro, ni vizitis la tradician salproduktejon *Troncalhada*, adaptitan kiel vivantan muzeon. Poste mallonga piedpromenado al Avejro, la malfrua tagmanĝo estis multe pli bongusta! La finaj vortoj kaj adiaŭoj okazis apud la centra kanalo kaj la tradiciaj ŝipoj de Avejro.

JMM



de ĉi tiuj linioj, blankbarbulo 64-jaraĝa, kiu kuraĝe enmiksiĝis en tiun amuzan grupon. (*)

Per kurioza ceremonio, oni volis atentigi ke en ĉi tiu renkontiĝo ne gravis la deveno de la homoj sed pli gravis la homoj mem. Por montri tion, oni simbole bruligis flagojn kiuj reprezentis ne nur landojn sed ankaŭ organizojn. Al kelkaj ĉeestantoj ĉi tiu rito ŝajnis malrespekta, tamen neniu kontraŭis ĝin kaj ĉiuj komprenis la signifon de tiu sorĉa ceremonio.

La evento elvolviĝis en tendumejo apartenanta al la loka komunumo, kiu permesis uzi ĝin senpage, elmontrante, tiamaniere, simpation al la esperantistaro. Ankaŭ la loka televido interesiĝis pri la okazintaĵo kaj raportis pri ĝi.

Pro la karaktero de la evento ne okazis kunsidoj, tamen ŝvebis en la aero forta deziro reeldoni ĝin, en Pollando, la postan jaron (*).

(*) La renkontiĝon partoprenis tri portugalianoj.

(§) En 2008, SenPrograma Renkontiĝo ne okazis.

ARANĜOJ:

Internacia Infana Kongreseto 2006

■ António MARTINS-Tuválkin

Dum vi legas tion ĉi, mi estas kun mia filino en la I.I.K. 2008, apud la U.K.-a Roterdamo. La Internacia Infana Kongreseto estas aldonata logaĵo de ajna Universala Kongreso kaj unika evento por infanoj esperantlingvaj: tuta semajno sen gepatroj! Rolinte unuafoje kiel I.I.K.-zorgisto dum la Florenca U.K., jen kelkajn komentojn pri ĝia lingva flanko, manke de kompleta raporto:



I.I.K.'06: Flaras la voston de bronza serpento en la Pirokja Parko tri el la plej junaj kongresaninoj.

AMT

Kiel menciite en <http://bertosch.free.fr/iik2006/alighintoj.html>, 23 I.I.K.-anoj (el 36) estis denaskaj esperantlingvanoj, en diversaj gradoj de aktiveco, kaj la ceteraj lernadas ĝin ankaŭ diversnivele. La averaĝo estas tamen tre alta.

Etaj krokodiloj

El la 36 infanoj kiuj partoprenis (konstante plus / minus du aŭ tri), deknaŭ scipovis en bona nivelo la francan, el kiuj plej multaj denaske. Eviti “krokodiladon” estis dekomence defio al la ĉeforganizanto, Bert SCHUMAN, kiu “dividis” tiujn inter la nefrancparolantojn dum la atribuo de dormĉambroj. Plia divido laŭ sekso kaj aĝo ne ĝenis la atingon ke en ĉiu el la sep dormĉambroj uzataj de la I.I.K.-anoj estis almenaŭ unu franclingvano kaj nenie tiuj mankis.

La rezulto de tiu klopodado ne estis tamen plene sukcesa; relative

multa komunikado okazis en la franca lingvo, kaj iom ankaŭ en la kroata, angla kaj germana.

Kompreneble, por infanaĝaj esperantistoj, denaskaj aŭ ne, plejofte ĉeestas nek la “ideologia” devsentito uzi esperanton, nek la minuskomplekso uzi “strangan” lingvon, do iel paradokse tiu parta “krokodilado” pravas refoje esperanton kiel plene normalan lingvon.

Aliflanke montriĝis necesa ĉiama praktikado, eĉ ĉe aktive hejmlingvaj denaskaj esperantistoj. Ekzemple, dum montrivera vadado unu el la (plej aĝaj, komunikivaj kaj spertaj) I.I.K.-anoj (AR13*) venis al mi kaj raportis ekscit- kaj naŭz-tone ke ili vidis «grandan fiŝon kun la [faŭk]o plena je [larv]oj», t.e. kun neesperantaj vortoj enŝovitaj pro bezono kaj nekonataj pro

(*) Mi laŭbezzone nomis I.I.K.-anojn laŭ nomicialo kaj aĝo, por malhelpi ĝenon de ilia privateco.

nesufiĉa praktikado. (Dum la I.I.K., mi klopodis roli kiel “enciklopedio” per konstanta nomado de aĵoj kaj agoj kaj per insista korektado.)

Ĉiukaze, instigojn al “nekrokodilado” mi faris konstante, eĉ se ne insiste, kaj trovis taŭgan kaj efikan adapton de la kutima argumentaro pri “lingva demokratio” — nome ke iuj infanoj longe vojaĝis por ĉeesti kaj malbonas ilin flankenmeti per uzado de lingvo kiun tiuj ne konas.

Tio ŝajne estas efika inter infanoj (ankoraŭ ne trafitaĵoj de kompleksoj pri la valoro kaj uzeblo de sia “lerneja angla”), kaj mi agrable supriziĝis konstatante ke iuj (ekz.: M12, M11) mem instigis aliajn per tia argumentado.

Mallaŭte sed aŭtente

Ĉe la plej junaj infanoj, sub 10 aĝ-jaroj, estas malfacile tuj ekscii la lingvan nivelon, pro infana “hontemo” paroli senĝene ĉe nekonataj plenkreskuloj — pri kelkaj, eĉ post pluraj tagoj, mi spertis agrablajn surprizojn:

Ekzemple, dum domenludado (cetero, dankon al U.E.A.-C.O. pro libroj kaj ludiloj!) la ege silentema kaj gestresponda H8 senhezite kaj senerare elektis la ĝustan vorton por bildo almenaŭ sep fojojn, eĉ je neskrebsimplaj vortoj kiaj “ŝuoj”. Plian ekzemplon: El L7, kiu ankaŭ malofte parolis

esperanton, mi ĉiam tamen ricevis plenajn respondfrazojn en tre klara (eĉ se mallaŭta!) kaj senerara lingvaĵo. (Pliajn similajn ekzemplojn povus raporti aliaj zorgantoj.)

Notindas ke du infanoj (A10, M7) kiuj travivis streĉajn plorajn momentojn ĉiam uzis esperanton, eĉ parolante kun la ĉeestantaj gepatroj.

La lingvujo estis rimarkinde homogena, eĉ se ne surprize tiel, konsiderante ke temas pri infanoj kies modelo de esperanto estas aktivaj movadanoj. Homogena do, sed ne sennu- ankaŭ — ja mi subaŭskultis konsiderojn ke, ekz., la interjekcio “fek!” estas kiel fivorto nedirenda sed senĝene uzebla en normala kunteksto (CG10, M7).

Notindas ankaŭ, eĉ ĉe kelkaj ne plene fluaj parolantoj, aktiva emo al vortludoj, frapfrazoj kaj kodvortoj. Ekz., B14 povis improvizi tradukon de aparte misplaĉa kanto (originale “*Mr. Brown, the Xmas tord*”, aŭ io tia), M13 kaj AL13 adaptis rapidan serenadon omaĝe al “nia” L.K.K.-ano Leonardo PAMPALONI, kaj pli ol duono de ĉiuj I.I.K.-anoj iel aniĝis al spontanaj manfrapaj aŭ kantripetaĵoj kun esperantaj vortoj (aŭ almenaŭ fone- moj). La refreno «Silente, mallaŭte» (ne originala sed populariĝinta en la I.I.K. 2006), ĉantata dum la UK-a Solena Fermo, estas plia ekzemplo. ■

ARANĜOJ:

Zfestoj sidejapude

Post la nekutima Zamenhoffesto de 2005 (NB89:9), la sekvaj okazigoj estis preskaŭ banalaj, eĉ se ŝatataj. Ambaŭ daŭrigis la tradicion pri sideje aranĝita kunmanĝo: En 2006 en apuda restora-

cio, kun nur ses ĉeestintoj; en 2007, organizate de Wilson BRÍGIDO kaj Olga ALMEIDA la 15-an de decembro mem, temis pri pli vasta sideja programo, kiun ĉeestis dudeko da esperantistoj. Cetero, pri la Zamenhoffesto de 2004 nenio aperis en NB sed nur en <http://esperanto.web.pt/zf2004.htm>. **AMT**

INSTRUADO:

Veteranojn lisboniajn

Komenciĝis meze de novembro 2007 kurso por komencantoj en Almada (*Almada*, sudborda lisbonia urbo), organizata de emeritula kleriga centro *Usalma* (*Universidade Sénior de Almada*, vd. NB88:7). Ilian peton al P.E.A. pri provizo de instruisto plenumis lokano Wílson BRÍGIDO. La lecionoj okazis dum la lernjaro en loka ŝtata mezlernejo *Emídio Navarro*, kaj ilin frekventis ok mezaĝaj lernantoj — nombro kiu restis konstanta ekde la kurseko.

ULTI-ligado en 2006

Samtipa organizo *Universidade de Lisboa para a Terceira Idade*, ĉe paroĥejo *Furnas*, Lisbono, instruis esperanton al sesopo en 2006 prof-o Aníbal GONÇALVES. En 2007 kaj 2008 tiu instruado ne pluis.

Esperanton UNIQ-e

En plia tia organizo *UNIQ e - Universidade Sénior de Queluz* (mun. *Sintra*), kursoj okazas jam depost 2006, gvidataj de M^a Luisa Pinto GOMES. En 2007, ĉeestis 4 lernantoj. **AMT**

INSTRUADO:

Sideja meznivela kurso

Kiel reago al la relative granda nombro da sukcesaj memeklernintoj dum la lastaj unu aŭ du jaroj, ĉefe uzantoj de la retejo *Lernu.NET*, Portugala Esperanto-Asocio organizas nun **meznivelan ĉeestan kurson**. La lecionoj okazos unufoje semajne, en la asocia sidejo (favorante la lisboniajn komencantojn, kiuj plej multas) kun 90-minuta daŭro; ilin gvidos António MARTINS-Tuválkin. Interesatoj kontaktu la sidejon; ĉiuj ekzameniĝu dum sesio okazonta ĝis fino de oktobro, laŭ anoncota plano. **Aliaj elpaŝoj** por plibonigi la lingvajn kaj movadajn spertojn de ĵusaj memeklernintoj preparatas. **AMT**

APLIKADO:

Novaj retaj ejoj

Post la raporto pri la esperanto-instrua retejo *Lernu.NET* (NB88:5), nove aldoniĝis kelkaj menciindaj retiniciatoj: **Ipernity.NET**, socia reto por kundivido de fotoj kaj tekstoj, lanĉiĝis kiel “beta” versio en marto 2007 kun esperantlingva (bone tradukita!) fasado. Ankaŭ **Amikumu.COM** estas interkona retejo, (dume) nur en esperanto; ĝi havis 1700 membrojn en komenco de 2008. La vakan spacon post la malapero en 2006 de la novaĵejo de Ĝangalo.ORG ekplenumas i.a. **Raporto.INFO**, dum **LiberaFolio.ORG** daŭre senrivalas pri movadaj novaĵoj, malgraŭ konkurenco flanke la retaj versioj de tradiciaj gazetoj. Similan vakajon plenigas **Farbskatol.NET** koncerne al esperantlingva televido, sed kiel simpla “vlogo”, dum la esperantlingva retradio multe kreskis: Ĉiuj radistacioj havas retan version, pli kvalitan kaj oportunan, kaj ekzistas similrolaj periodaj “podkasto” — elstare tiu de **RadioVerda.COM**. Menciindas ankaŭ novaj aplikaj retejoj, kiaj **ek-Laboru.COM**. Dume progresigo kaj plivastigo de la esperantlingva Vikipedio (**eo.Wikipedia.ORG**) ne ĉesas. Intertempe banaliĝis elektebli esperanton kiel interfacan lingvon en kelkaj gravaj retejoj, nome en tiuj de **Google.ORG**. Fine, kreskas la esperantaj agadoj en la virtuala mondo **SecondLife.COM**. **AMT**

BULTENO:

Jen korektoj por tajperaroj de NB89 (paĝo, kolumno, sekcio, linio(j); minuso supren-sencon; vd. aktualan liston en http://esperanto.web.pt/nb_jusa.htm#korektoj):

pĝ. kl. sk.	lin.	eraro	korekto
1 3 1	7-8	el tiuj, malmultaj	el tiuj malmultaj
2 2 1	10	li foje	li disfoje
2 2 1	11	el tiuj	el tiaj
3 1 1	-9	septembre	septembre
3 2 2	3	nia membro	niaj membroj
5 2 1	-5	au preskau	aŭ preskaŭ
5 2 2	3	min kvazaŭ	kvazaŭ
6 2 2	1, 3	(2)¶¶(1)	(1)¶¶(2)
7 2	-11	ankaŭ	profitis
9 2 1	8	specialaĵoj	specialaĵojn
9 2 1	10	sekvis	pluis
10 1 2	-7	urbo mem	urbo mem:
10 1 2	-7	troviĝas en la urbo mem kaj je	troviĝas je
11 1 2	10	plu	pli
11 1 2	-2	mem mi ne	mi mem ne
11 2 1	-1	ĉ. 1000,00 €.	ĉ. 1000,00 €.)
13 2	8	eksterlande	eksterlanden
13 2	22	sed ne	sed tiam
13 2	27	finis	finiĝis
13 2	29	eblias	ebligas
14 1	-6--7	ko- rpo	kor- po

BULTENO:

Ĉu via lasta ricevo?

Laŭ ĵusa estrara decido post propono el estrarano Nuno MAGALHÃES, tiuj membroj kiuj sciigos tiun preferon **ne** ricevos ĉe si la kutiman paperan ekzempleron de *Nia Bulteno*, kontentaj per la ebleco samtempe ricevi komputdokumenton en formato “pdf”, kiun ĉiu povas mem surpaperigi.

Interesatoj **b.v. kontakti la asocion** tiuteme. Tiun preferon oni povos ŝanĝi kiam ajn, kaj paperaj ekzempleroj estos disponeblaj por posta uzo en la sidejo. Je redaktfino jam sep membroj aniĝis al tiu reĝimo.

Tiu ĉi elekteblo ŝparigas al la asocio paperon, tempon, pres- kaj eksped-kostojn, kaj fald- kaj vinkt-laboron. **AMT**

SIDEJO:

Novan komputilon

En marto 2008 finfine anstataŭĝis la ĉefa sideja komputilo: Alvenis nenova sed multe pli bona maŝino, kiu jam ĉefrolis en pluraj nun “malblokitaj” laboroj. Ĝi kostis 350,00 € al “malavara donacinto”, kaj indas nun almenaŭ parte repagi. Tial P.E.A. akceptas mondonacojn, eĉ se malgrandajn. **AMT**

✉ Letero Amikoj ☐

«Mi nomiĝas Samad QARLUQ. Mi skribas al vi de la Afganujo. Ni fondis kademon»(?)«antaŭ ne tre longa tempo; mi bezonas esti via korespondamiko. Bonvolu akcepti mian mesaĝon. Ĝis baldaŭ!»

Samad QARLUQ

✉samad_qarluq@yahoo.com

La Karavelo

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

LITERATURO
BUNTA – BELA – BONA



Aprezu! Abonu! Anoncu! ~ Legu senpage en PDF!

lakaravelo@gmail.com

laste ricevita
interŝanĝnumero

nº de sócio
ult. quota paga
lasta kotizpago
foto

DESTINATÁRIO:

Associação Portuguesa de Esperanto
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL

REMETENTE: